

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Luna nokto

tradukita de Manfredo Ratislavo

La Tero, de l' Ĉielo
Kisita sajnŝi (1)
Ke en florbril' Ŝi devus
Songadi nur pri Li.²

La vent' tra l' kampoj blovis,
Ondetis la spikar',
Susuris la arbaroj
Kaj brilis la stelar'.

Animo mia alten
Sin svingis de la Ter'
Kaj flugis kvazaŭ hejmen
Trankvile tra l' aer'.

*Traduko de la Germana poemo "Mondnacht" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-165-327 (2004-02-06 19:30:51)

²La vortoj „Ŝi“ kaj „Li“ estas tie ĉi skribitaj majuskle por esprimi, ke la la Tero kaj la Ĉielo estas kvazaŭ personigitaj de la poeto.